




I. S. TURGENEV.

PATROJ KAJ FILOJ.

TRADUKIS EL LA RUSA LINGVO

D-ro K. BEIN (КАБЕ).



LIBREJO

„Esperanto“.

28, Tverskaja, Moskvo,
Rusujo.

Книжный Магазинъ

„Десперанто“.

28, Тверская, Москва,
Россія.

1909.

Книжный магазинъ

„ЭСПЕРАНТО“.

Москва, Тверская 28.

Moskva librejo

„ESPERANTO“.

Tverskaja, 28, Moskvo.

Складъ пособій для изученія языка Эсперанто русскими:

Verkoj de D-ro L. L. ZAMENHOF.

Учебникъ языка Эсперанто	— р. 25 к.
Полный эсперанто—русскій словарь съ производными и интер- національными словами	— р. 80 к.
Полный русско-эсперантскій Словарь	1 р. — к.
Ekzercaro (собрание упражненій)	— р. 30 к.
Traduko de l'Ekzercaro (переводъ упражненій)	— р. 20 к.
Universala vortaro (всеобщій словарь)	— р. 40 к.
Fundamenta Krestomatio (основная хрестоматія)	1 р. 40 к.

Verkoj de D-ro K. Bein (Kabe):

La fundo de l'mizero, trad. el Sieroszewski	— р. 30 к. Fr. 0,75.
La interrompita kanto, trad. el Orzeszko	— р. 30 к. Fr. 0,75.
Pola Antologio	— р. 80 к. Fr. 2,—.
Internacia Krestomatio	— р. 45 к. Fr. 1,15.
La Faraono (3 vol.)	2 р. 40 к. Fr. 6,—.
Elektitaj fabeloj de Fratoj Grimm.	— р. 75 к. М. 1,50.
Unua legolibro	— р. 75 к. М. 1,50.
Versaĵoj en prozo, trad. Turgenev.	— р. 40 к. Кор. 40.
En malliberejo, de Ĉirikov	— р. 10 к. Кор. 10.

Т. А. ШАВИНСКІИ. Полный учебникъ языка Эсперанто	1 р. 25 к.
А. САХАРОВЪ. На пути къ братству народовъ. Сборникъ статей о языкѣ Эсперанто на Эсперанто и русскомъ языкахъ, съ приложеніемъ грамматики яз. Эсперанто и двухъ словарей	— р. 60 к.
ЧЕФЕЧЪ. Ключъ языка Эсперанто (словарь и грамматика)	— р. 2 к.
КАРЪ и ПАНЬЕ. Эсперанто въ десять уроковъ. Перев. съ французскаго	— р. 20 к.

2161
116



I. S. TURGENEV.

PATROJ KAJ FILOJ.

TRADUKIS EL LA RUSA LINGVO

D-ro K. BEIN (KABE).



LIBREJO

„Esperanto“.

28, Tverskaja, Moskvo,
Rusujo.

Книжный Магазинъ

„Делеранто“.

28, Тверская, Москва,
Россія.

1909.

Verkoj de dr. K. Bein (Kabe):

La Fundo de l'mizero, trad. el Sieroszewski (2-a eldono).

La Interrompita Kanto, trad. el Orzeszko (2-a eldono).

Pola Antologio. (2-a eldono).

Internacia Krestomatio.

Elektitaj Fabeloj de Fratoj Grimm.

Unua Legolibro (2-a eldono).

La Faraono, trad. el Prus.

Versaĵoj en Prozo, trad. el Turgenev.

Patroj kaj Filoj, trad. el Turgenev.

Aparte eldonitaj noveloj:

En malliberejo, trad. el Ĉirikov.

En Fumejo de l'opio, trad. el Reymont.

Bona sinjorino, trad. el Orzeszko.

I.

— Nu, Petro? Vi vidas ankoraŭ nenion?—demandis la 20-an de majo de l'jaro 1859 viro ĉirkaŭ kvardekjara, en palto, kovrita de polvo kaj en pantalone el kvadratita ŝtofo, elirante sen ĉapo sur la malaltan peronon de gastejo ĉe la ŝoseo N. La demandita servisto estis plenvanga junulo kun senkolora lanugo sur la mentono kaj kun malgrandaj senbrilaj okuloj.

Ĉe la servisto ĉio: la turkusa orelingo, la pomaditaj haroj, la edukitaj gestoj, ĉio unuvorte montris homon de la nova progresema generacio. Li ekrigardis indulge la vojon kaj respondis kun memestimo:

— Nenion. absolute nenion!

— Nenion?—diris la mastro.

— Nenion absolute!—ripetis la servisto.

La sinjoro eksopiris kaj sidiĝis sur malgranda benko. Ni konigos lin al la leganto, dum li sidas, krucinte sub si la krurojn kaj medite ĉirkaŭrigardante.

Oni nomas lin Nikolao Petroviĉ Kirsanov. Li posedas, dek kvin verstojn de la gastejo, belan bienon de ducent kamparanoj, aŭ farmbienon de du mil «desiatinoj» *), kiel li nomas ĝin de l'tempo, kiam li aranĝis siajn rilatojn kun la kamparanoj laŭ la moderna maniero. Lia patro, unu el niaj generaloj de l'jaro 1812, duonklara, vulgara, sed ne malbona homo, pursanga Ruso, griziĝis en la uniformo. Li komandis unue brigadon, poste divizion, vivis konstante en la provinco, kie li ludis sufiĉe gravan rolon dank'al sia rango. Nikolao Petroviĉ naskiĝis en la sudo de Rusujo, same kiel lia pli aĝa frato Paŭlo, pri kiu ni parolos poste; li estis edukata hejme ĝis la aĝo de dek kvar jaroj, ĉirkaŭata de malkaraj guvernistoj, de adjutantoj kun senceremoniaj, sed servutaj manieroj kaj de aliaj personoj de la regimento kaj stabo. Lia patrino, naskita fraŭlino Koliazin, nomata, kiel knabino, Agato, kaj kiel gene-

*) Proksimume unu hektaro.